

BULTENO de REU

№ 88, Februaro 2017



RUSIAJ ESPERANTO-TAGOJ 2017 DUA INFORMILO

Dato : 2 – 9 de aŭgusto 2017

Loko : Jaroslavla provinco, u. Poŝehonjo, str. Zagorodnaja, 7, bazejo de ripozo kaj turismo “Ĉudnóĵ Dvor” (“Strangula Korto”). Kondiĉoj kaj prezoj por loĝado:

Hotelo

- a) Baza prezo por unuloka lito = 980 rbl / persono / diurne.
b) Ekstra prezo = 850 rbl / persono / diurne, kondiĉe, se oni dormos

en 2-loka lito duope.

- c) Divanlito = 650 rbl / persono / diurne.
d) Familia 2 - loka lito por paro = 1120 rbl / persono / diurne.

Ĉiuj ĉambroj enhavas necesejon, duŝon. Oni liveras po 3 viŝtukoj kaj pantoflojn.

Lignaj domoj

Domo numero 1:	Domo numero 2:	Domo numero 3:
Unuloka lito = 990 rbl / persono / diurne.	Unuloka lito = 1350 rbl / persono / diurne.	Duloka lito = 1000 rbl / persono / diurne.
Duloka = 860 rbl / persono / diurne.	Duloka lito = 1100 rbl / persono / diurne.	Divanlito = 750 rbl / persono / diurne.
Divanlito = 750 rbl / persono / diurne.	Divanlito = 750 rbl / persono / diurne.	

En la domo numero 2 estas sauno

En ĉiu domo estas necesejoj, duŝoj, malsupre granda manĝo – areo kun foteloj, divanoj, granda tablo. *Endas konsideri, ke kun pli da loĝantoj en ĉiu ĉambro prezoj malgrandighas. Do, pensu, elektu, grupigu!*

Amasejo kun propraj dormosakoj kostas 139 rbl / persono / diurno.

Tendumado. Unu tendoloko depende de la tendograndeco kostas ekde 270 rbl / diurne.

Mangado

Estos organizota en la bazeja restoracio. Kaze de la favora vetero oni servos ekstere sub la grandega tegmento. 3-foja ĉiutaga mangado = 770 rbl.

Memstara kuirado sur teritorio de la bazejo estas malpermesata!

Provizora programo

Konferenco de REU. “Lego -Tago” omaĝe al 140-jara jubileo de I. Ŝirjaev kun riĉa programo. Somera Universitato. Atelieroj: lingva, literatura, kanta, instruista, traduka. Aktivula trejnado. Koncertoj, kvizoj, ludoj, konkursoj. Sportumado. Libroservo. Lignofajroj.

Pri ekskursoj, trafiko, renkonto-akompano la informo sekvas.

Por interesigantoj antaŭ RET estas proponata speciala religia programo “Ortodoksa kunumado” inter la 27.07 – 01.08 kun vizitoj de preĝejoj, diservoj en kelkaj urboj, partopreno en festa kruca procesio en u. Tutaev laŭ la bordo de Volgo. La detalan informon bonvolu peti ĉe pastro-monaĥo Taŭriono: ilija@yandex.ru

Bonvolu antaŭpagi la loĝadon 50% de la elektota varianto al la kasisto de REU ĝis la 25 de aprilo. Dankon!

BONVENON AL MISTERA POŜEHONJO!!!

Novojarsko-2017

La 30-an de decembro 2016 - la 5-an de januaro 2017 en Novosibirsk (la azia parto de Rusio) sukcese pasis Esperanto-renkontiĝo "Novojarsko-2017". La ĉefa celo de la E-aranĝo estis plej gaje adiaŭi la pasintan jaron kaj renkonti la Novan. La E-aranĝon pastprenis 1 franco, 1 hispano, 29 personoj el la azia parto de Rusio kaj 1 hundino Ĝina el Novosibirsk. Ĝina estis proklamita kiel *miss* "Novojarsko-2017", ĉar ŝi perfekte plenumis ĉiujn komandojn en Esperanto. Ĉiuj ĉeestintoj aklamis kaj aplaudis dum ŝia prezentado de la trukoj. Certe neniu ĉeestinta fraŭlino aŭ virino (kaj ankaŭ eĉ viro) povus superi ŝin en tiu ĉi konkurso. Ĝina estis la plej juna kaj plej vigla en "Novojarsko-2017". El rusiaj e-istoj 1 venis el Berdsk (Novosibirska regiono), 1 – el Barnaul, 1 – el Ĉeljabinsk, 2 – el Jekaterinburg, 4 – el Tomsk, 5 – el Krasnojarsk, 15 – el Novosibirsk. Iuj partoprenintoj demandis: "Kial ne venas akademiano de la Akademia de Esperanto Sergio Pokrovskij, kiu loĝas en Novosibirsk?" Novosibirskanoj respondis, ke oni forgesis telefoni al li.

La plej ĉarman impreson lasis ĝuste la dumnokta festa bankedo kun multaj distraĵoj, konkursoj, dancoj, kantoj, promenadoj laŭ la festanta urbo kun fajraj pafsalutoj, promenadoj ĉirkaŭ bele ornamitaj grandaj abioj kaj piceoj...

En aliaj tagoj okazis ekskurso en la urbo, vizito al parko Zajelcovskij (skiado, teumado en mongol-stila teumejo...), vizito al la zoologia parko, vizito al la japana domo, ekskurso en la Akademia urbeto apud Novosibirsk.

La aliaj programeroj okazis en la E-klubejo. Hispana e-isto Rafael Mateos Gonzales kelkfoje gvidis konversacian rondon pri la temoj: "Kio estas lingvo", "Kial Esperanto ne estas lingvo", "Kio estas bona Esperanto" ktp. Tamen ne ĉiuj konsentis kun iuj liaj dubindaj tezoj. Okazis diversaj E-ludoj, E-kvizoj kaj E-konkursoj, kiujn gvidis la prezidantino de Novosibirska E-Klubo Katerina Arbekova kaj Evelina Sokolova el Krasnojarsk. Tomskano Gennadij Basov gvidis konkurson de sciantoj de maloftaj E-vortoj. Tiun konkurson gajnis Galina Terentjeva el Ĉeljabinsk kaj Vladimir Minin el Tomsk (ambaŭ kun 31%-a sukceso). La tablotenisan konkurson gajnis Rustam Karapetjan el Krasnojarsk (la 2-an lokon okupis Andreo Klujev el Novosibirsk).

La komisiono pri la regiona agado de REU proponas nomumi esperantistinon Katerina Arbekova kiel esperantiston de la jaro 2016 de la azia parto de Rusio pro ŝia sukcesa organizado de "Renkontiĝo de Amikoj" en Kazan' (julio, 2016), "Novojarsko-2017" en Novosibirsk, disvastigo de Esperanto en Novosibirsk...

Vladimir MININ

MER-7 kaj MER-8



11.12.2016 Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova okazigis **7-an Moskvan Esperanto-renkontiĝon**. (MER-oj estas propra aranĝo de la organizantoj, sendependa de kiu ajn asocio aŭ klubo.) Tio estis la plej amasa unutaga MER, kiu akceptis 20 partoprenantojn (la pasinta 3-taga MER-6 havis 30 partoprenantojn; unutaga MER-5 - 18 partoprenantojn). Plejparto de ili estis spertaj rusiaj esperantistoj. Ankaŭ ĉeestis gastoj el Britio/Honkongo kaj Ukrainio. Ĉeestis ankaŭ kelkaj studentoj

kaj kursfinintoj de Esperanto-studprogramoj de RUDN-universitato.

Estas interese, ke ĉi foje ĉirkaŭ duono de la partoprenantoj apartenas al "TEJO-aĝo".

Perfekte estis realigita riĉega programo, kiu daŭris ĉ. 10 horojn:

- Esperanto-aranĝoj pasintaj kaj estontaj. Rakontoj, fotoj. *S. Smetanina, A. Nistratov, D. Ŝevĉenko, A. Striganova.*
- Komuna kantado. *M. Povorin, A. Vikulov*
- Koncerto. *M. Povorin*
- Poezia horo. *L. Novikova, D. Gasper, V. Melnikov ka.*
- Prelego: El la vivo de Ivan Ŝirjaev. Kontribuo al la iam kompletigota biografio. *Ilja Smikov*
- Fabeloj pri vintraj festoj. *A. Striganova*
- Novaĵoj en retaj aferoj. *D. Ŝevĉenko*
- Prelego: Diversa kompreno de E-vortoj rilate al la homoj el diversaj landoj. *V. Melnikov*

05.02.2017 la sama brava geparo efektivigis **8-an MER-on**. Kiel kutime, ĝi daŭris ĉ. 10 horojn. Ĝi atingis rekordon pri la kvanto de partoprenantoj – 22 (el Rusio, Ukrainio kaj Belgio). Ŝajnas, ke la ĉefa evento estis prezento de nova libro, eldonita de Impeto, pri Esperanto-poeto Konstantin Gusev. Dum la aranĝo tradicie okazis abunda manĝado, kiu ĉifoje transformiĝis al vera bankedo kun multe da bongustegaj diversspecaj manĝoj, preparitaj de Anna Striganova, ĉampano kaj dolĉaĵoj, inkluzive profesie preparitan torton forme de la Esperanto-flago, kiun alportis Vera.

En la programo okazis la sekvaj eroj:

- Signifo de la antikva greka filozofio por Esperanto. *Nikolao Gudskov*
- Premiero de la libro pri la konata Esperanto-poeto Konstantin Gusev (ruslingve). *Viktor Gusev*
- Kristin Tytgat respondas (en formo de intervjuo konferenco)
- Literatura vespero. *Valentin Melnikov, Aleksej Nistratov*
- "Ronda tablo" pri revuo Esperanto kun la novaj redaktoroj Anna Striganova kaj Dima Ŝevĉenko
- "Mi estas pokalo de belpoezio" (omaĝe al 120-jara naskiĝdato de Eŭgeno Miĥalski. Novaj tradukoj de liaj poemoj". *Ludmila Novikova*
- Komuna kantado. *Mikaelo Povorin*
- Aktivulo.net: nova retpaĝaro por Esperanto-aktivuloj. *Dima Ŝevĉenko*



Nova formo de Zamenhof-tago



La nova publika MASI-aranĝo – **Festo de libroj en diversaj lingvoj honore al Ludoviko Zamenhof** – sukcese pasis la 18-an de decembro, en kinejo "Kosmo", dum 6 horoj seninterrompe. Grandan kontribuon faris Maksim Silantjev (teknika helpo), Sofia Zareckaja (Moderigo de Rondo de Legado) kaj Aleksej Samsonov (Libra Montrofenestro). La programon kontribuis gemasianoj Natalia Laziĉ (Slava Tablo) kaj Peĉjo Fedosov (deklamado ĉe la Podio) kaj moskvaj esperantistoj Nikolao Gudskov kaj Mikaelo Povorin el la klubo "Lev Tolstoj". Kelkaj masianoj ĉeestis la Feston. Tamen – maltrio da kunorganizantoj por tiom grava kaj granda evento, ve. Feliĉe, ĝi eliras al pli vastaj spacoj ol limigita esperantista mondo, kaj, espereble, trovos novajn kunlaborantojn.

Irina Gonĉarova,

Moskva Esperanto-Asocio "MASI"

Zamenhof-festo en Jekaterinburgo

La 17an de decembro en la ĉefurbo de Uralo okazis tradicia Zamenhof-festo, kiun partoprenis 20 esperantistoj el tri uralaj urboj: Jekaterinburgo, Surguto, Tjumeno. La sukcese realigita programo variis kaj rilatis al temoj, ligitaj plejparte kun la vivo kaj verkaro de Ludoviko Zamenhof: esperantistaj festotagoj kaj historio de la Tago de la Esperanta literaturo (Vladimir Opletajev); rezultoj de la regiona retmesaĝa projekto “30 tagoj kun zamenhofaj proverboj” kaj kvizo (Raja Kudrjavceva); la internacia Esperanto-sumoo por librolegado en Esperanto kaj uralaj esperantistoj (Irina Kirina); revuo de interesaj libroj en Esperanto i.a. temis ankaŭ pri la nova romano de Mikaelo Bronŝtejn (Aleksandr Osincev); realigo de la projekto “Amikumu” (Lena Ĥusanova), amika ĉetabla festenbabilado kaj fotado.

La uralajn esperantistojn salutis videe Olga Ŝilajeva el Glazovo kaj Jana Ĥusanova el Marsejlo, kie ŝi ekstudis por atingi doktoran sciencan gradon.

Vladimir Opletajev

Reala vivo

Burokrata forpuŝo

Jen kun kiu letero ni turnis nin okaze de okazonta ĉi-jare en Soĉi Tutmonda Junulara Festivalo:

*В национальный подготовительный Комитет
XIX Всемирного Фестиваля молодежи и
студентов*

Уважаемые господа, дорогие друзья!

Всемирная эсперанто-ассоциация (УЭА) и ее молодежная секция (ТЭЙО), представляющая движение эсперантистов в более чем 120 странах, в том числе и в России, и имеющая консультативный статус при ООН и ЮНЕСКО, с неподдельным интересом следят за подготовкой к проведению XIX Всемирного Фестиваля молодежи и студентов. Мы высоко ценим фестивальное движение и с удовлетворением восприняли решение о проведении мероприятия мирового масштаба в 2017 году в России. 60 лет назад в Москве проходил VI Всемирный Фестиваль молодежи и студентов, в котором приняли участие также молодые эсперантисты из разных стран. Участие советских эсперантистов в то время практически возродило эсперанто-движение в нашей стране. УЭА, коллективным членом которой является и наша российская организация эсперантистов, выступает за равноправное, справедливое решение проблем в сфере языковой и межкультурной коммуникации, за сохранение культурного многообразия и непосредственный диалог народов разных стран и континентов. Эти же цели имеет и фестивальное движение.

Эффективным решением проблемы межнационального общения является язык эсперанто. Зародившийся в Российской империи 130 лет назад, он политически нейтрален, имеет миллионы adeptов во всем мире, признан авторитетными международными организациями (включая ЮНЕСКО). В совершенстве овладеть эсперанто можно в течение одного года. Начальный курс занимает около двух месяцев.

Молодежная организация ТЕЙО ежегодно проводит международные встречи в различных странах, где молодежь общается на одном нейтральном языке. Мы осмеливаемся предложить подготовительному Комитету использовать прекрасную возможность, включив использование эсперанто в программу Фестиваля, как одного из методов общения в современном мире.

Наша организация готова содействовать в участии в Фестивале эсперантистов из разных стран, сотрудничать в осуществлении различных программ (встречи, презентации, доклады, концерты, дискуссии, выставки и др.), а также осуществить перевод основных документов Фестиваля на эсперанто.

С пожеланиями успехов

Президент РoСЭ С. Сметанина

Kaj jen kion ni ricevis responde:

Добрый день!

Благодарим Вас за высокую оценку значимости Фестиваля и проявленный интерес к главному событию 2017 года в России в сфере молодёжной политики.

Выражая признательность за работу с талантливой молодежью в рамках реализации приоритетных направлений государственной политики в сфере культуры, отмечаем, что высоко ценим значительный вклад в вовлечение молодежи в активную культурно-социальную и общественную жизнь страны.

Ваши предложения будут учтены при формировании проекта культурной программы Фестиваля. Дополнительную информацию можно получить у координатора культурной программы Фестиваля – Исмаковой Анастасии Евгеньевны, электронная почта:

[ac.....>@russia2017.com](mailto:ac.....@russia2017.com)

Eventoj

NOVA REDAKTORO-PARO POR LA REVUO "ESPERANTO"

Unuafoje en la historio de la revuo Esperanto, ĝi oficiale havos du redaktorojn, la geedzan paron Dima Ŝevĉenko (31) kaj Anna Striganova (29). Tiel decidis la Estraro de UEA, kiu intervjuis ankaŭ du aliajn bonajn kandidatojn por sekvi Attila Kaszás en tiu grava posteno.

Ni estis tre impresitaj de la propono, per kiu Dima kaj Anna kandidatiĝis, komentas la Prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes. Ili kune disponas pri granda gamo de kapabloj, ne nur pri la enhava redaktado, sed ankaŭ pri grafiko kaj enpaĝigo kaj pri la reteja flanko de la revuo. Tiu kombino de fortoj ŝajnas al ni tre promesplena.

Ambaŭ homoj laboras parttempe ĉe la prestiĝa Rusia Universitato de Amikeco inter la Popoloj en Moskvo, kie ili studis ĵurnalismon (Dima) kaj literaturon (Anna) ĝis nivelo de magistriĝo kaj jam preparas doktorajn disertaciojn por defendo. Ĉe Dima, denaska esperantisto, la diplomverkoj ĉiam rilatas al Esperanto kaj ĝia loko en la mondo de amaskomunikiloj. Interreto grave rolas en ilia nuntempa laboro, ĉu en praktika laboro pri la retejo de la Filologia Fakultato, ĉu kiel instrutemo kaj esplorobjekto. Kvinjara laboro ĉe la rethotela kompanio “masterhost” donis al Dima multajn teknikajn konojn sur tiu kampo.

En Esperanto, ili estas konataj kiel la gvidantoj de la grava eldonejo Impeto, kiun fondis en 1992 la gepatroj de Dima, Aleksandr kaj Elena Ŝevĉenko (kune kun Dimitrij Perevalov). De tiu tempo la eldonejo aperigis pli ol 300 librojn en Esperanto kaj la rusa lingvo. Post la forpaso de la fondintoj (Aleksandr en 2012, Elena en 2015), Dima kaj Anna sukcese pluportas la torĉon. Per tiu okupo ili lernis multe pri tekstoredaktado kaj enpaĝigo, same kiel pri la intereso kaj preferoj de la Esperanta libromarketo. Ili estas aktivaj en la moskva Esperanto-movado, kie ili organizis plurajn popularajn aranĝojn. Ili kunlaboras ankaŭ pri instruado de Esperanto en diversaj medioj.

Anna kaj Dima transprenos la revuon ekde la aprila numero 2017. Kune kun la preparado de sia unua numero, ili planas krei *modernan retejon de la revuo, kiu celos interagi kun la abonantoj kaj aŭtoroj*, kiel ili proponis en sia kandidatiĝa letero. Tia integriĝo de la tradiciaj paperaj eldonaĵoj en la interretan mondon estas por ili aparte interesa, teorie kaj praktike. Aldonas Fettes: *Tio plene kongruas kun niaj planoj por la evoluigo de UEA. Retaj servoj estas grava parto de nia strategio por kreskigi kaj aktivigi nian membraron, kaj ni vidas kernan rolon por la revuo kaj ĝia retejo. Ni antaŭĝojas kunlabori kun la novaj redaktoroj por realigi tiun vizion.*



Skriba KER-sesio en Moskvo ĉi-jare

Skriba KER-sesio ĉi jare en Moskvo okazos la 10-an de junio. La skriba ekzameno laŭ internaciaj postuloj de Komuna Europa Referencadro estas organizata en Moskvo jam de kelkaj jaroj. Laŭ la kvanto de ekzamenoj Moskvo estas en la tria loko inter 70 landoj kun ĝis nun 134 sukcesintoj.

Eble ni povus veni al la dua loko, se niaj esperantistoj, aktivuloj kaj novuloj pli aktive kaj serioze rilatus al ĉi tiu ekzameno. La ekzameno pritaksas la nivelon de tri bazaj lingvokapabloj: bazan, mezan kaj superan. Tiuj niveloj konformas al la prisktiboj de KER je B1, B2 kaj C1. Krome, oni ricevas ateston pri la ekzameno en 4 lingvoj.

Limdato por registro al la skriba sesio en Moskvo estas la 1-a de majo 2017. Kun petoj, demandoj bonvolu turni vin al la ĉeforganizanto de la KER-sesio, reprezentanto de ILEI en Rusio Svetlana Smetanina. Bonvenon!



Ni pri ni

NI VIVU LONGE, FELIĈE KAJ FELIĈIGE, NI ĜUU NIAN ESPERANTISTECON KAJ NIAN MALFERMITECON AL LA MONDO!

INTERVJUO DE BORIS KOLKER POR FORMOZA FOLIO



- Ĉu vi povus prezenti vin?

= Mia nomo estas Boris Kolker. Mia kromnomo estas Ĉiĉerono en Esperanto-lando.

- Kiun profesion vi havas?

= Pliparton de mia vivo mi laboris kiel tradukisto de scienca kaj teknika literaturo, ĉefe pri naftoindustrio. Antaŭ tio mi instruis la lingvosciencan, la francan kaj latinan lingvojn en universitatoj. La lastan jardekon, post la elmigro en Usonon el Rusio, mi laboris kiel oficej-estro en komputila kompanio.

- Kiam vi estis knabo, kiu estis via ambicio por via plenaĝa vivo?

= Mi revis fariĝi ĵurnalista.

- Kio estas via plej forta memoro pri infaneco?

= Estis oktobro de la 1944-a jaro. La 2-a Mondmilito ankoraŭ daŭris. Ni revenis el Uzbekio en la liberigitan urbon Kiŝinevo (Moldavio, Sovet-Unio). Malfrua vespero. Neniu

lumo en stratoj, laŭlonge de kiuj staras ruinoj de bomb-detruitaj domoj. Mi estas 5-jaraĝa.

- Kio estis la unua libro, kiun vi legis en Esperanto?

= “*Petro*”. Eldonejo SAT. Parizo. 1956 (8a eldono). Internacia lernolibro por laboristoj. Plene en Esperanto.

- Kio estas via plej ŝatata libro?

= “*Kredu min sinjorino!*” de Cezaro Rossetti.

- Kiu estas la libro, kiun, laŭ vi, ĉiuj esperantistoj bezonas legi?

= Ĉu estas iu dubo? Certe, “*Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta Kulturo*”! Ĝia tralego egalas al tralego de biblioteko.

- Kiam kaj kiel vi komencis verki?

= En aŭgusto 1960, dum la 2-a Balta Esperanto-tendaro en Estonio Vytautas Ŝilas kaj mi tradukis el la rusa en Esperanton la tekston de tiam ege populara kanto “*Indonezio*”.

- Kiel venis al vi la ideo verki lernolibrojn de Esperanto?

= En februaro 1970 mi lanĉis mian amasan korespondan kurson de Esperanto, en kiu dum 23 jaroj diplomiĝis preskaŭ 900 personoj el ĉiuj regionoj de Sovet-Unio. Ĉar dum dudeko da jaroj Esperanto estis malpermesita en Sovet-Unio, mankis lernolibroj por ruslingvanoj. Tial dum du jaroj mi uzis por tiu kurso la supremenciitan lernolibron “*Petro*”. Ĉar mi laboris kiel interpretisto-tradukisto kun teknikistoj de la franca aŭtomobila kompanio “*Renault*”, kiu konstruis motor-uzinon en nia urbo Ufa, mi sukcesis havigi al mi latinliteran tajpilon

(nekredebla maloftaĵo tiutempe!). Mi retajpdis la lecionojn kaj sendadis ilin al miaj lernantoj. Fine mi decidis mem verki lernolibron – ja laŭdiplome mi estis instruisto de lingvoj. Mi faris tion en la 1972a jaro kaj sekvajare mi sukcesis publikigi la lecionojn en la regiona junulara ĵurnalo. Dum pli ol 40 jaroj tiu lernolibro estis perfektigata kaj reeldonata kaj nun estas konata kiel Plena lernolibro de Esperanto por ruslingvanoj.

- Ĉu vi havas kontakton kun viaj legantoj?

= Jes, mi estas en kontakto kun centoj da miaj lernintoj kaj legantoj.

- Iuj aŭtoroj havas ĉiam oportunan kajeron, en kiun ili notas ideojn kaj frazojn, kiuj trairas iliajn kapojn. Iuj skribas sur papero unue kaj nur poste tajpas la tekston. Kaj vi, ĉu vi havas skribo-ceremoniaron?

= Iam mi skribis notojn sur paperon. Jam delonge mi tajpas ilin en mian komputilon. Tial, kiam venas tempo por prepari novan eldonon de iu mia lernolibro, mi jam havas listegon kun eventualaj difoj.

- Ĉu vi pensas ke skrib-talento venas el disciplino aŭ naturo? (Do you think that writing talent is nurture or nature?)

= Verŝajne, el ambaŭ.

- Kio estus via unua konsilo por iu, kiu dezirus esti verkisto?

= Rememoru iun tre interesan epizodon en via vivo, priskribu ĝin kaj konigu al viaj amikoj.

- En “*Vojaĝo en Esperanto-lando*” oni povas legi tekstojn de multaj gravaj Esperanto-verkistoj. Ĉu vi renkontis multajn el ili?

= Jenaj aŭtoroj de tekstoj mi renkontis: William Auld, Gaston Waringhien, Claude Piron, Majorie Boulton, Tibor Sekelj, Eugeno Bokarĵov, John Wells, Trevor Steel, Hilda Dresen, Louis Beaucaire, Humphrey Tonkin, Spomenka Ŝtimec, Istvan Nemere, Julian Modest, Vladimiro Samodaj, Nadija Andrianova, Mikaelo Giŝpling, Mikaelo Bronŝtejn, Arthur Baur, Nikolaj Aleksiev, Den Drown, Sergej Kuznecov, Nina Cvileneva. Legado de iliaj verkoj kaj komunikiĝo kun ili (persona kaj korespondada) riĉigis mian vivon.

- Vi verkis kelkajn famajn Esperantajn lernolibrojn por studentoj de malsamaj niveloj.

Ĉu vi foje pensas pri verki romanon, fikcion, verkon de teatro?

= Mi pensis verki tre originalan libron pri Ludoviko Zamenhof kaj kolektis ideojn kaj materialojn pri tio. Sed mi ne trovis tempon. Kaj nun jam estas malfrue okupiĝi pri tio.

- Vi estas membro de la Akademio de Esperanto; kion ĝi reprezentas por vi?

= Mi estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto en la 1992-a jaro kaj reelektita por du pliaj 9-jaraj periodoj. Mi kunlaboras en jenaj sekcioj: Ĝenerala Vortaro, Kontrolado de lerniloj kaj Lingva Konsultejo; la lastan mi gvidis dum 3 jaroj. La Akademia laboro ne estas tre rimarkebla ekstere, sed grava por la evoluo de Esperanto. Mi enmetas en ĝin mian kompetentcon.

- Vi ankaŭ estas membro de la Akademio Literatura de Esperanto (ALE); ĉu vi povas diri al ni kelkajn vortojn pri la celo de ALE?

= Ĝi estis fondita en la jaro 1983. Ĝia celo estis stimuli kaj plialtniveligi la Esperantlingvajn verkadon kaj kritikarton, kaj agnoskigi la Esperantan literaturon en kaj ekster la Esperantomovado. Ŝajnas al mi, ke en la lastaj jaroj ALE estas malpli aktiva.

- Vi verkis doktorigan disertacion pri “*Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto*.” Ĉu vi pensas, ke kelkaj kulturoj aŭ lingvoj havis ŝlosilan rolon en la apero kaj evoluo de Esperanto?

= Mi povas respondi la demandon pri la apero de Esperanto. Ĝia leksiko estas bazita sur internaciaj elementoj de jenaj gravaj eŭropaj lingvoj laŭ jena ordo: franca, angla, germana kaj rusa. En la formiĝo de Esperanto la rusa lingvo ludis la rolon de la decida kontrola lingvo: en Esperanton eniris unuavice tiuj eŭropismoj, kiuj iĝis elementoj de la rusa lingvo kaj plej ofte en la formo, kiun ili akiris en la rusa lingvo. Al la evoluo de Esperanto influis unuavice kulturoj kaj lingvoj de elstaraj Esperantaj verkistoj kaj vortaristoj. La unua periodo estis la rusa, unuavice danke al tio, ke Ludoviko Zamenhof kaj unuaj verkistoj loĝis en la Rusa imperio. Ege grava estis la franca periodo.

- En “*Vojaĝo en Esperanto-lando*” oni povas legi pri la diktatora regado de Stalin. Ĉu vi pensas, ke junuloj ne sufiĉe konas pri tio, kion homoj kiel Hitler, Stalin kaj probable diktatoroj en aliaj landoj faris al esperantistoj?

= Verŝajne, junuloj ne sufiĉe konas pri tio, kvankam estas facile alirebla la brila libro de Ulrich Lins “*La danĝera lingvo*”. Tamen pli gravas ne la historio, sed la realo: diskonigo, lernado kaj diversspeca utiligo de Esperanto.

- **Vi estis kunfondinto de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado), ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj), SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio), REU (Rusia Esperantista Unio), komitatano de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), komitatano kaj ĉefdelegito de UEA, vicprezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) kaj kunlaboris al multaj gravaj projektoj kaj agadoj. Ĉu vi pensas iam verki biografion, kie vi rakontus al ni pri ĉi tiuj spertoj?**

= Mia amiko Vladimir Samodaj verkis tiaspecan libron sub la titolo “*Esperanto kaj vivo*”, por kiu mi verkis antaŭparolon. Estus alloge, se ankaŭ mi rakontus pri mia vivo libroforme. Sed, ŝajnas, ke mia malpliiginta energio ne sufiĉos por tiu laboro. Tamen iujn interesajn epizodojn el mia vivo mi rakontis en kelkaj publikigitaj rakontoj kaj intervjuoj.

- **Ĝak le Puil kantas “*Kiam regos am’ sur ter’*”, traduko de “*Quand les hommes vivront d’amour*”, kanto de Raymond Lévesque el Kanado. Li diras: “*Kiam regos amo sur tero, Trobadoriĝos la soldato; for la militon, for la karceron! Sed ni jam estos mortaj, frato!*”. Ĉu vi pensas, ke iam amo aŭ paco regos sur tero? Ĉu vi pensas, ke venos la fina venko?**

= La amo kaj la paco, kaj ankaŭ la fina venko de Esperanto vivu unuavice en nia koro! Ni vivu longe, feliĉe kaj feliĉige, ni ĝuu nian esperantistecon kaj nian malfermitecon al la mondo!

*Boris Kolker, civitano de Esperanto-lando
Formoza Folio, N-ro 19*

Oni pri ni

“**Vespera Moskvo**” Pri Esperanto

En unu el la plej popularaj kaj legataj urbaj ĵurnaloj de Moskvo aperis tre bona artikolo pri Esperanto-kurso de Irina Gonĉarova “*Faru la rondon!*” La artikolo estas pozitiva, evidentas simpatia rialto de la aŭtoro (Varia Rajevskaja) al la kursgvidantino kaj ideo de Esperanto. La artikolo legeblas <http://vm.ru/news/2017/01/10/esperanto-zamechatelen-tem-cto-pered-nim-vse-ravni-346050.html>

Informoj kaj raportoj

Raporto pri la regiona agado de REU en 2016

La plej aktiva regiona E-agado en Rusio:

1. En la azia parto de Rusio pli aktivis esperantistoj de Novosibirska, Krasnojarska, Tomska, Jekaterinburga kaj Krasnodara (urbo Soĉi) regionoj. Plej aktive agadis Novosibirska Esperanto-Klubo kaj ĝia prezidantino Katerina Arbekova.
2. En la eŭropa parto de Rusio pli aktivis esperantistoj de Krimea respubliko, Tatarstano, Moskva regiono, federacia urbo Moskvo.
3. Bedaŭrinde, kelkaj personoj el S-Peterburgo aktivis kontraŭ Esperanto kaj kontraŭ esperantistoj kaj favore al la angla lingvo – tio okazas en la grupo “*Esperanto*”: <https://vk.com/priesperanto>. Plej misaktivis tiurilate iuj Konstantin Olsin kaj Boris Zelenov, kiuj dum jaroj spamigas la grupon per provokaj diskutoj kun propagando. Mi opinias, ke peterburgaj esperantistoj devus iel influi tiajn personojn – almenaŭ per plifortigo de pozitivaj agoj.

Ankaŭ en multaj aliaj regionoj esperantistoj aktive agadis, sed mankas pli detalaj informoj pri iliaj agadoj.

Ankaŭ nemembroj de REU aktive agadis en iuj rusiaj regionoj. Ekzemple, la teamo de “*La Ondo de Esperanto*” aktive agadis en Kaliningrada regiono.

REU-komisiito pri la regiona agado kaj pri la rilatoj kun KAEM,

Vladimir MININ

La januara Ondo senpage legebla

La 30an de decembro 2016 en la eĵutejo de “*La Ondo de Esperanto*” aperis la januara numero de ĉi tiu revuo, kiu nun ne plu aperas papere, sed estas eldonata kiel bitgazeto (elektronika gazeto) laŭ la popularaj normoj “pdf” kaj “ePub”. Dum la posta semajno la abonantoj jam eĵutis la januaran “*Ondon*” aŭ ricevis ĝin perpoŝte, kaj la redakcio de “*La Ondo de Esperanto*” sojle de la orient-kristana Kristnasko disponigis ĝin senpage, por ke ĉiu deziranto povu legi ĝin kaj decidi pri (ne)abono.

La 65-paĝa kolorplena januara “Ondo” (2017) estas nun libere elŝutebla en la kiosko de “Sezonoj”:
<http://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>
“La Ondo de Esperanto” (11 numeroj + literatura suplemento) estas abonebla kontraŭ nur 15 eŭroj ĉe niaj perantoj, UEA-konto, kaj per PayPal/bankkartoj. La loĝantoj de Ruslando kaj Belorusio povas aboni kontraŭ nur 750 Rusiaj rubloj.

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Peĉjo admirigas (Infomcele publikigita en Google+)

Dum du lingvofestivaloj en Rusio estis la 12-jara Petro Fedosov, la plej juna lingvoprezentanto tra la historio de MLF kaj eble eĉ tra la 20-jara historio de ĉiuj lingvaj festivaloj en la mondo. Fluparolanta esperantisto-aŭtodidaktulo ekde la fino de la pasinta jaro, Peĉjo prezentis Esperanton, kaj faris tion kun nekredebla majstreco. Admirojn kaj gratulojn li meritas! Tial prezento lia sur jutuba kanalo bonvenintus...

Herman Deceuninck, Belgio

Nia kulturo

Ni daŭrigu nian poezian konkurson!

La ĵurio en la konsisto de Nikolao Gudskov, Valentin Melnikov kaj Svetlana Smetanina pritaksis la versaĵojn, venintaj al la konkurso. Estis proponite traduki rusen la poemon de **Julio Baghy** “Aŭtuna foliaro”. La unuan lokon okupis la traduko de Mikaelo Bronŝtejn, kiun li faris en la jaro 1975 kaj prezentis en Leningrado. Ĝin laŭdis mem sinjoro Etkind. Jen la teksto:

Листья в час осенних плясок –
Сто оттенков, сотни красок.
Их, горящих в неге синей,
Гонит ветер, студит иней.
Здесь – один, а дальше – стаей
Погружаются, взлетают,
И несётся шрох, шёпот,
Жёлтых жалоб скорбный ропот
После сильного порыва
Так бесцельно и тоскливо!
Замедляется движение –
Собираются в круженье
Лечь остывшими телами
Под печальными стволами.

La duan lokon meritis Ludmila Novikova, la trian Lubovj Karpeta (u. Vladivostok, E-klubo “Pacifiko”). Gratulojn al la partoprintojn kaj novajn sukcesojn!

Por la sekva etapo ni proponas la versaĵon de **Eŭgeno Miĥalski**, kies 120-jara datreveno estis ĉi januare. La titolo estas “**Kristaloj de neĝo, facetoj glaciaj...**”, publikigita en la libro “Kantoj de amo kaj sopiro” (1934):

Kristaloj de neĝo, facetoj glaciaj
Kaj varma altuŝo de ŝia manet’ –
Jen estas la tempo por belfantazio
De juna flamema, amanta poet’!

Kupolo ĉiela kun brila stelĥoro,
Rapida flugkuro de glitveturil’,
Konfeso subita pri sento de l’koro
Sub lula kareso de la sonoril’

Kaj ŝajnas konfuzo de la junulino,
Persista konvinko kun kisakompan',
Subita neĝfloka ŝutiĝ' de sur pino,
Kaj ruza ridet' de l' okulo-cejan'!

Bruet' veturila sur neĝo krakanta,
Kaj ronk' de ĉevaloj, jam lacaj pro kur',
Jen estas inspiro por juna amanto,
De liaj konfesoj, promesoj kaj ĵur'!

Bonvolu pli aktive partopreni kaj sendi viajn kreaĵojn al la redakcio de la Bulteno.

Novaj libroj

Libro pri Konstantin Gusev




La ruslingva libro estas dediĉita al 100-jara jubileo de la fama poeto-esperantisto Konstantin Gusev. Lia filo kompilis multajn faktojn el la vivo de sia patro. La lingvaĵo estas interesa, simpla. La enhavo estas atentokapta. Eldonis la libron eldonejo "Impeto". La libron eblas aĉeti ĉi tie <http://lernolibro.ru>. Agrablan legadon.

Por "sciuloj" de Esperanto

La novjorka eldonejo "Mondial" aperigis la libron de la fama odesa esperantistino **Tatjana Auderskaja** "**Intelektaj amuzoj**". Lingvaj ludoj en Esperanto" (ISBN 9781595693228, 114 paĝoj. Mola bindo). En ĝin eniris literaj amuzoj – vortaj amuzoj – tekstaj amuzoj – ŝercaj amuzoj – poeziaj

amuzoj – krucenigoj. La aŭtorino mem tiel karakterizas sian libron: "Diversaj lingvaj ludoj kaj amuzoj aperas en la gazetaro de Esperanto ekde ĝia naskiĝo. Antaŭnelonge estis eldonitaj serioj de krucenigoj de Stano Marĉek, ĉifraĵoj de Nora Caragea... Sed ankoraŭ ne aperis diversflanka libro, kiu provus kunligi sub la sama kovrilo multajn specojn de plej variaj lingvaj amuzoj. Jen la provo. En tiu ĉi libro estas kunigitaj multaj amuzaj ludoj, de literaj ĝis tekstaj kaj eĉ poeziaj. Iuj estas kreitaj laŭ skemoj jam konataj (precipe en ruslingvaj intelektludaj medioj); aliaj estas inventitaj de la aŭtoro mem; sed ĉiuj estis aprobitaj de esperantista publiko dum iuj komunaj aranĝoj. Ni esperas, ke konatiĝi kun tiu vastega mondo de mensotrejnaj taskoj estas utile por ĉiu esperantisto, ekzercanta sian cerbon por propra plezuro kaj por la utilo kaj disvolviĝo de nia kara lingvo".



Forpasis Vladimir Bepalov



La duan de februaro, nokte dumdorme, subite mortis Vladimir Ivanoviĉ Bepalov. Li naskiĝis 21-an de januaro 1940-a jaro en Siberio, en Tisula distrikto de Kemerova provinco, en 1963 translokiĝis al Soĉi kaj tie tuj eklernis Esperanton de Tatjana Kulakova (avino de I. Gonĉarova). Kune kun ŝi ili baldaŭ fondis la lokan klubon "Laro", kiun post forveturo de Kulakova el Soĉi en 1974 li gvidis dum jardekoj. Laŭ la diplomo de Taganroga Pedagogia Instituto (1976) li estas instruisto de la germana lingvo, sed laboris ne nur kiel instruisto, sed en tute diversaj lokoj, i.a. en fabriko de glaciaĵoj. Vladimir senĉese instruadis Esperanton (ankaŭ al siaj infanoj, kiuj fariĝis

denaskaj esperantistoj), organizis kaj kunorganizis aron de regionaj kaj landaj aranĝoj, tendaroj, renkontiĝoj – i.a., Rusian Esperanto-Kongreson en 1993. Li estis unu el la unuaj aktivuloj de SEJM (Sovetia Esperantista junulara movado, 1966-1979), kaj senlace agis en Esperantujo dum duonjarcento. Estrarano de SEJM, de ASE (1979-1989), de SEU (1989-1991) kaj de REU ĝis 1999... Ĉiam konvinkita komunisto, li estis unu el gravaj aktivuloj de IKEK (Internacia Komunisto Esperantista Kolektivo) kaj membro de SAT; partoprenis en kelkaj SAT-kongresoj – la lastajn fojonoj li kontribuis SAT-kongresajn programojn en Jalto en 2012 kaj en Madrido en 2014. Ekde 2005 ĝis 2016 li organizis ĉiujare (krom 2008) en Soĉi 10 malfruaŭtunajn renkontiĝojn TILE (Tagoj de Internacia Lingvo Esperanto) – la lastan je malpli ol 3 monatoj antaŭ la forpaso... Lia ĉarma rideto kaj ĉiama humuro estas konata al ĉiuj.

Sincerajn kondolencojn al la familianoj, klubanoj, amikojj...

Ni ne forgesos vin, kara Volodja!

Helan memoron!

Svetlana Smetanina, Nikolao Gudskov

Ŝajnas al mi, ke mi estis konata kun esperantisto Vladimir Bepalov dum mia tuta vivo. Ja mi renkontiĝadis kun li praktike ĉiujare (kaj pli ol unufoje jare). Li estis tre laborema kaj laborkapabla. Li ĉiam laboris minimume en 2 lokoj kaj krom tio multe por Esperanto kaj por disvastigo de komunismaj ideoj ĝis sia 77-jara aĝo. Li estis la plej honesta el ĉiuj komunistoj, kiujn mi konis. Se ĉiuj homoj laborus, kiel li, la komunismo jam venkus antaŭ multaj jaroj. Li laboradis ankaŭ por Esperanto ne por profito, sed por efektiviĝi ĝiajn noblajn idealojn.

La lastan fojon mi renkontiĝis kun li dum TILE en Soĉi (Rusio) la 28-an de oktobro - la 7-an de novembro 2016. Guste li (la unua inter la esperantistoj) eksciis, ke en oktobro 2017 okazos la 19-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj (TFJS) en Soĉi. Kai ni jam komencis plani eventualan partoprenon de esperantistoj en la 19-a TFJS. Ni ankaŭ planis inviti la 9-an Azian Kongreson de Esperanto al Soĉi por oktobro de la jaro 2019.

La lastan fojon mi vidis lin kaj parolis kun li la 7-a de novembro apud la monumento de Lenin en Soĉi. En tiu dato ĉiuj komunistoj de la urbo kolektiĝas tie ĉiujare. Li rakontis pri siaj planoj festi la 100-jaran jubileon de Granda Oktobra Socialista Revolucio en la sama loko post unu jaro la 7-an de novembro 2017 kaj pri planoj de komunistoj okaze de tiu ĉi datreveno. Sed lia koro ne povis plu funkcii por tiom ege streĉa vivo kaj paneis tute ellaborita la 2-an de februaro 2017, kiam li estis 77-jara kaj 12-taga sume. Ege bedaŭrinde. Nia vivo iĝis malpli senc-enhava sen li.

Funerbrante kaj kondolencante al liaj proksimuloj (parencoj kaj e-istoj),

Vladimir MININ

Mia samurba frato... La verva nigrohara junulo maldikega – ofta gasto de nia hejmo, kune kun mia avinjo kreanta la E-klubon en Soĉi, la homo, kiu gvidis min al mia plej unua en la vivo E-tendato – en Litovion.

Kara Volodja! Dankon! Mi estas la homo, kiu vere neniam forgesis kaj neniam forgesos vin!

Irina Gonĉarova

Estas malfacile kredi, ke tio okazis.

Vladimir Bepalov lernis Esperanton en la 1963a jaro, estis unu el la unuaj aktivuloj de SEJM kaj senlace agis en Esperantujo dum duonjarcento.

Li mankos al ni ege!

Boris Kolker

Februare foriras amikoj –

stranga fato.

Sen ajna kompatato

ripetiĝas subita ekbato.

Vanas ŝrikoj.

Kaj imagu, jam marto proksimis –

tagoj sunaj,

kaj vi estas junaj!

Kial por vi la nadloj fortunaj

haste “sorton” kaj “morton” eniris?

Kial la rabobirdo Destino

murde bekas vin,

vin, kiuj vekas

nin por vivi, vin, kiuj amegas

vivohelon sen fino?!

Februare vintreg’ manifestas

frostan forton,

fatalon, formorton,

senesperan minoran agordon,

tamen restas

la espero pri l’ marta rekreo,

l’ vortoj veraj

de viaj sinceraj

kaj feliĉaj poemoj surteraj

por plu vivi sen veo.

Mikaelo Bronŝtejn

Decidoj de Estraro de REU 14.02.2017

1. Okazigi Konferencon de Rusia Esperantista Unio dum RET en Poŝeĥonjo en la periodo inter la 3-a kaj 8-a de aŭgusto 2017.

2. Pro konstanta malhonesta konduto kaj publikaj ofendoj rilate estraranojn kaj aktivularon de REU, misuzo de dissendo-listoj kaj sociaj retoj membreco de Valentin Viktorovich **Melnikov** estas suspendata ĝis ricevo de oficialaj pardonpetoj. Se tiuj pardonpetoj ne aperos ĝis fino de februaro 2017, V.V. Melnikov estos definitive eksigota el membroj de REU-Estraro.

La Bulteno de REU (BdR) atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio